


La Krokodil'



Informilo de Esperanto-Kultur-Centro de Tuluzo

En tiu ĉi numero Dans ce numéro

Nouveaux cours	1
Voyage à Sarajevo	2
Kelkaj vortoj pri FESTO	2
Volontula raporto de Anjo	3
Observado de steloj	6
Sur la paŝoj de Zamenhof	7
L'agenda du Kroko'	8

"La Krokodil'" est le bulletin d'information du Centre Culturel Espéranto de Toulouse, association pour la promotion et l'enseignement de l'espéranto. Si vous souhaitez contribuer au "Krokodil'", merci de nous faire parvenir vos articles et photos.

Tous les articles du "Krokodil'" sont mis en ligne sur le blog, où il est également possible de laisser des commentaires.

Visitez notre blog "La Krokodil'"
<http://lakrokodil.wordpress.com/>



**ESPERANTO-KULTUR-CENTRO
DE TULUZO**
Centre Culturel Espéranto de Toulouse
31, rue Franc 31000 Toulouse
Tél. : 05 61 62 39 48 - 06 31 68 00 26
E-mail : esperanto.toulouse@free.fr
Site : www.esperanto.toulouse.free.fr

Nouveaux cours dans la région.

Cette rentrée 2011 voit s'élargir, dès le mois d'octobre l'offre de cours d'espéranto en Midi-Pyrénées.

A **Albi**, l'association Tarn Espéranto s'est associée à l'*Université pour Tous du Tarn* pour (re)proposer un cours annuel pour débutants et faux-débutants, à l'Université Champollion, le mardi soir.

A **Montauban**, c'est dans le cadre de l'*Université Populaire* qu'un cours à l'année sera proposé le lundi soir, sous réserve d'un nombre d'inscrits suffisant.



A **Toulouse**, Le Centre Culturel Espéranto proposera également ce nouveau cours annuel le mercredi soir à l'ENSEEIH, école d'ingénieur du centre-ville, en plus des cours express habituels proposés par l'association.

Ces 3 cours seront animés par Christophe Chazarein, qui enseigne l'espéranto depuis des années sur Toulouse, lors de stages partout en France ou de son volontariat européen en Pologne. Diplômé cette année de l'Université de Poznan pour l'enseignement de l'espéranto, il pourra mettre en oeuvre tout son savoir-faire au service de tous ceux qui veulent se lancer dans l'apprentissage de la langue internationale.

L'objectif de ce cours sera de préparer les élèves au niveau B1 dit "autonome" du CECRL (Cadre Européen Commun de Référence pour les Langues) qui permet de communiquer dans la majorité des situations de la vie courante, en voyage ou en congrès. Ce niveau pourra être validé en fin d'année par un diplôme. Différents projets d'échanges internationaux (correspondance, voyage...) seront proposés dans le cadre de ces cours.

Parlez-en autour de vous, les inscriptions sont ouvertes !

Marion

Voyage à Sarajevo

Nous étions dix de la région de Lavour à partir pour Sarajevo au congrès SAT, dont 2 non espérantistes. Nous sommes partis à trois voitures, et il nous a fallu quelques jours pour arriver jusque là-bas. C'était un petit congrès (à peu près 75 personnes), mais très sympathique.



Il y avait des débats, des spectacles, comme dans tout les congrès, mais l'accent a été particulièrement mis sur la visite de la région, avec souvent la guerre récente en toile de fond. Ainsi, nous avons visité Mostar, ville magnifique et son fameux pont, détruit par les Croates pendant la guerre et reconstruit à l'identique par des architectes turcs. Puis une visite de tunnel clandestin sous l'aéroport, qui a été pendant une longue période le seul point de

ravitaillement de Sarajevo assiégée. Enfin une visite à Srebrenica, lieu d'un des plus grands massacres de la guerre (8000 exécutions sommaires)

Malgré ces aspects un peu sombres (pouvait-on les éviter ?) le congrès s'est déroulé dans une ambiance particulièrement festive, amicale et joyeuse. Sarajevo est une belle ville, ainsi que toute la région.

Daniel

Kelkaj vortoj pri FESTO

En la kastelo Grezijono, inter la 8a kaj la 15a de Aŭgusto okazis FESTO.

Kiel kutime, ĉiuvespere estis koncertoj, dank'al Floreal Martorell, kiu ĉiam perfekte zorgas pri ĉiuj muzikteknikaĵoj.

Bonŝance la vetero estis preskaŭ ĉiam bona, kaj la scenejo, antaux la kastelo, estis en mirinde belega loko, ĉefe kiam la koncertoj komenciĝis dum la sunsubiro!

Fakte, dum la tuta semajno, mi estis sufiĉe okupata, mi estis kuirhelpanto ofte kaj tagmeze kaj vespere, sed estis ĉiam bona etoso, kaj ni multe babilis kaj ridis en tiu kiurejo!

Mi tamen feriiis dum unu tago por partopreni la ekskurson al la apudaj kasteloj, en unu el ili, la gvidistino estis bo-filino de Esperantistino kiu ofte venas al Grezijono, eĉ se ŝi ne parolis la lingvon! Ni tamen provis intertrakti kun ŝi ke la venonta FESTO okazu en tiu luksa kastelo, sed ni bedaŭre ne sukcesis konvinki ŝin.

Nun mi estas en la Centra Oficejo de UEA, kien mi iris rekte de FESTO por labori kiel volontulo ĉe TEJO dum unu jaro.



Sebĉjo

Volontula raporto: bonaj rememoroj...kaj bonegaj :)

Saluton, karaj!

Kiel vi scias, mi – Hanna (Anjo) Mykytyn, Jalta esperantistino – estis elektita por volontuli ĉe EKC dum du monatoj – majo kaj junio 2011.

Mi alvenis surloken merkrede, la 4an de majo kaj tuj estis bonvenigita pere de Marion Quenut, unu el kunorganizantoj de tiu ĉi projekto de volontulado. Dum kelkaj tagoj ŝi estis afabla por gastigi min kaj konatigi iom kun la asociaferoj kaj tiuj venontaj projektoj en kiuj mi, laŭ mia deziro, povus partopreni.

Dum la sekvaj tagoj, antaŭ ol tiuj planitaj aferoj komenciĝis, mi havis iom da libertempo kaj dum tiuj ferioj havis eblecon iomete malkovri Tuluzon kaj ĉirkaŭaĵojn, ĉarmajn lokajn kutimojn kaj tradiciojn, kiujn oni povas ekscii nur partoprenante la lokan vivon.

Vendrede, pro mia alveno, okazis tiel nomata ‘manĝoklaĉo’, la renkontiĝo, dum kiu ĉiuj asocioj kaj aliaj esperantistoj kunportas ion por manĝi kaj dum la tuta vespero « klaĉas » pri novaĵoj pri esperanto kaj en esperanto. Dum tiu ĉi amuza etoso mi, manĝinte, trinkinte kaj respondinte multajn demandojn, havis eblecon iom alkitimiĝi kaj konatiĝi kun aliaj multaj esperantistoj kiuj ĉeestis dume, – asociprezidanto, Daniel Maynaŭ kaj lia edzino, familio Cash, ĉe kiu mi ankaŭ loĝis dum kelkaj semajnoj, Flo Martorell, kiu okupiĝas pri E-muzikeldonejo ‘Vinilkosmo’, KiKi, aktorino de TTT (Teatro Trupo de Tuluzo) kaj gvidistino de radioelsendoj en esperanto kaj multaj aliaj agrablaj homoj.

La sekvontajn tagojn, dank’ al alia juna asocio, Sébastien Denux, kiu, interalie, estis elektita por volontuli ĉe TEJO-oficejo en Rotterdamo por tiu ĉi jaro kaj jam eklaboris tie, mi konatiĝis kun alia ĉarma parto de Francio – departemento Aude, regiono Langedoko, Narbono, ĉarma ĉemara urbo, mezepoka kastela urbeto Karkasuno, ĉarma franca vilaĝeto Saint-André-de-Roquelongue, kies pejzaĝoj alproksimiĝas al tiuj ĉi de Krimeo, regiono, el kiu devenas mi...

Do, tiu ĉi estis la unua semajno de mia Tuluzo ĉeestado. La sekvintaj estis jam pli laborplenaj. Do, dum preskaŭ du semajnoj, okazis jam multaj prezentoj, budoj kaj atelieroj, dum kiuj oni havis belegan eblecon malkovri esperanton. Okazis budoj kadre de Eŭropa semajno en Tuluzo, sur la ĉefa placo de Kapitulo, kaj alia apuda urbeto, Tournefeuille, kies esperanto budo estis, laŭ mi, ĝia grava parto, ĉar por tiu tendenco de Eŭropa lingvodiverseco esperanto ja tre valoras.



Poste okazis ankaŭ budoj kadre de alia kulturaranĝo ‘Pas de Quartier pour les Inégalités’, kies celo estis montri, ke ne devas esti kulturmalegaleco inter la homoj. Kaj tiuj ĉi budoj intence okazis ne en urbocentro, sed en aliaj kvartaloj. Kaj dum tiuj ĉi budoj, kun multaj aranĝoj, koncertoj, ludoj, ktp., ne tiom kutimaj por la forcentraj ‘kvartaloj’, vizitis nin vere interesataj kaj dankemaj homoj, do la utileco de tiuj ĉi aranĝoj evidentas.

Okazis ankaŭ ateliero dum alia aranĝo, kutima por Parizo, kaj nova en Tuluzo, – ‘Fête de l’Humanité’ (‘Festo de Humaneco’), dum kiu inter koncertoj de lokaj kantistoj, ankaŭ estis prezentita esperanto. Kiu estas celo de tiuj multaj budoj? Laŭ mi, se eĉ eble homoj, post kiam

interesiĝas pri la lingvo, ne tuj eklernos ĝin, tamen ricevas informojn, kaj poste, eble eĉ post kelkaj jaroj, kiam oni mencias pri ĝi, jam almenaŭ scias, pri kio temas kaj laŭeble kaj laŭdezire, povas daŭrigi.

Krom tiuj multaj kulturaranĝoj en Tuluzo okazis ankaŭ la 14an, 15an kaj la 16an de majo alia 'aĵo' – Iberia Renkontiĝo en Katalunio, en agrabla eta vilaĝeto apud Ĝirono. El Tuluzo partoprenis eĉ 'karavano' – ok homoj. Ni alvenis tien vendrede vespere, precize dum interkona vespero, kaj tuj renkontis multajn konatojn pere de aliaj junularaj renkontiĝoj. Malgraŭ ke la renkontiĝo ne estis tre granda (partoprenis malpli ol 100 homoj), programo estis sufiĉe abunda, estis kelkaj ekskursoj al apudaj urbetoj kun oficiala inaŭguro de la renkontiĝo en la urba biblioteko de unu el ili, debatoj pri lingvodiverseco de Katalunio, atelieroj pri diversaj aĵoj, kiel ido-lingvo, kursoj de popol'dancoj, kaj, kompreneble, bona etoso, kiun subtenis granda koncerto de 'Kaj Tiel Plu'...



La lastan tagon de renkontiĝo okazis ekskurso al Ĝirono, ĉarma kataluna urbo, kie tiam okazis Festivalo de floroj, dum kiu estis grandaj manifestacioj, koncertoj de la loka muziko...

Fine de la renkontiĝo ni ekis al alia kataluna vidindaĵo – Barcelono, kaj restis en tiu belega urbo dum du tagoj... Certe, estas eta periodo por tiu ĉi grandega urbo, sed tamen ni sukcesis ĝui kelkajn la plej gravajn kaj, laŭ mi, vizintindajn lokojn, kiel la plej konata preĝejo Sagrada Familia de Antoni Gaudí kaj urbocentron... Revenis ni per regiona trajno, tra hispanaj kaj francaj Pireneoj, kies pejzaĝoj vere belegas....

Tuluzen reveninte, ni denove havis kelkajn projektojn, kie bezonatis Esperanto-budoj. Unu el la plej grava de ili estis Forumo de Lingvoj, kiu okazis la 29an de majo. Tiu ĉi forumo estas unu el la plej grandaj kulturaj aranĝoj de la urbo, kie ĉiu lingvo kaj nacio de Tuluzo havas eblecon reprezenti sin. Multkoloraj naciaj kostumoj, bongustegaj nekutimaj manĝaĵoj, muziko, – bonega ŝanco malkovri kulturdiversecon. Esperanto bonege prezentis sin: krom la kutima informbudo, oni havis eblecon ludi amuzajn gramatikajn ludojn, spekti fotojn, aŭskulti kaj aĉeti esperantan muzikon, reprezentitan per Vinilkosmo.



La 4an de junio sekvis la Forumon alia grava aranĝo, kiu regulare okazas en la regiono – Esperanto Semajnfina Staĝo en Arrout, agrabla montara vilaĝeto, kies 'esperanta' domo kutimas gastigi esperantistojn. Tie estis organizitaj kelknivelaj eo-kursoj, gviditaj per Marion kaj Christophe, kuirateliero, kie ni kun Nico, la ĉefa eo-kuiristo, gvidis la kuiradon de ukraina nacia manĝaĵo, – barĉo kaj varenikoj, kiujn ni poste ĝuis dum vesperamanĝo. Ankaŭ komence de la staĝo okazis mia datreveno, koran dankon al ĉiuj partoprenatoj kaj organizantoj, kiuj gratulis min kaj okazigis veran feston.

Ankaŭ mia volontula laboro inkludis vizitojn al aliaj kluboj de la regiono. Do tuj post la staĝo mi kun alia esperantistino Solange Durou ekis al Pau, kie la 6an de junio ni organizis prelegon pri Ukrainio. Dum la prelego ĉeestis proksimume 6-8 lernantoj kaj ankaŭ kelkaj aliaj esperantistoj el la urbo. Preleginte iomete pri Ukrainio, ni kun Solange proponis al la aranĝpartoprenantoj komenti fotojn de Jalto, kiujn mi preparis por ili. Tiel, ni havis praktikan lecioneton de Esperanto.

Tuj poste – la 8a de junio – diskutvespero en Bagnères, diverstema diskuto pri Ukrainio kaj ne nur pri ĝi 😊 Partoprenis ĝin lernantoj de la kurso gvidita per Robin Beto (esperante mi skribis la familnomon), ankaŭ junulino, kiu ekdeziris lerni esperanton kaj unu maljunulo-komencanto el Parizo, entute ni estis proksimume 10 personoj.

La 9a de junio – mi partoprenis en esperanto-prezento en liceo de Bagnères, organizita de Robin. Okazis ĝi kadre de literaturleciono, la temo ‘utopio’. Dekomence oni diskutis pri la temo de utopio, demandinte, kio estas utopio por lernantoj. Poste ni proponis paroli pri esperanto kadre de utopio, Robin klarigis la ĉefajn regulojn en amuza formo, poste li prezentis min kiel ukraina esperantistino, mi rakontis pri mia eo-sperto, kial mi bezonas esperanton, kiel ĝi helpas min, ktp. Fine ni demandis la lernantojn ĉu esperanto estas utopio por ili. Ni prelegis dufoje por diversaĝaj grupoj.



Reveninte Tuluzen, la saman tagon, oni organizis filmovesperon, – mi iomete rakontis pri la sovetdevena filmo, kiun mi proponis por spektado, kaj tuj poste ni ekspektis ĝin. Ŝajnis al mi, ke ĉiuj ŝategis tiun ĉi viglan kaj ridindan komedion (‘Ivan Vasiljeviĉ ŝanĝas la profesion’) faritan laŭ samnomata teatraĵo de Mikaelo Bulgakov, fama soveta verkisto.

La 14a de junio okazis manĝoklaĉo en Cabanes kun la lernantoj de Daniel Maynau. Post la manĝo ni diskutis pri Ukrainio, estis ni proksimume 11-13personoj.

La 21 de junio okazis oficiala prelego pri Ukrainio en turismoficejo de Villeneuve de Aveyron. Partoprenis ĝin proksimume 20 personoj, inter kiuj nur kvar-kvin esperantistoj, la aliaj venis dank’ al anoncoj disvastigitaj tra la tuta urbo per turismoficejo kaj printitaj en la urbogazeto. Tial mi parolis esperante kaj Andre Andrieŭ tradukis france. Fine de la prelego aŭskultantoj faris demandojn pri Ukrainio, esperanto mem, ktp...



La 24an de junio partoprenis mi en eo-kursoj en Foix organizitaj de Rene Ballaguy. Okazis ĝi en la agrabla kaj amika konversacio, dum kiu mi prezentis Ukrainion, Krimeon kaj Jalton, ili, aliflanke, prezentis sian regionon kaj urbon. Ankaŭ alia ukraina volontulino Maria Yasnyska el Lvivo (kiu volontulas en Foix kadre de eŭropa volontula servo dum duonjaro) helpprezentis Ukrainion aldoninte amuzan filmeton pri ukraina kulturo. Estis ni proksimume 8-10 personoj.

Post tiu traregiona ‘turneo’ ankoraŭ estis kelkaj aranĝoj kiujn mi povis partopreni dum mia lasta semajno tie, kiel budoj ĉe Festivalo de la Tero, aperitivan okaze de oficiala fermo de la asocia

biblioteko, babilvespero kaj renkontiĝo kun gelernantoj de la fulmokurso, gvidita de Christophe Chazarein, la lasta radioelsendo (kiun mi finfine sukcesis fari en la franca post kelkaj miaj partoprenoj en esperanto; dankon al bonegaj gvidantoj de radioelsendo – Rikardo Cash kaj Christine Vidotto (KiKi) – pro la akcepto tie), lasta manĝoklaĉo en belega vilaĝo Belcastel, lastaj adiaŭoj... Kompreneble, mi ne volis lasi ĉiujn tiujn agrablajn homojn, multaj el kiuj fariĝis bonegaj miaj amikoj.

Dankon, Tuluzo, pro tiu neforgesebla sperto, kiun vi donacis al mi kaj aparte al miaj bonegaj gvidantoj dum la tuta ĉeestado tie – Marion Quenut kaj Christophe Chazarein, dank' al kiuj, laŭ mi, EKC kaj Esperanto en Tuluzo evoluas kaj prosperas

Ĝis la venonta,
amike kaj elkore,

Anjo

Observado de steloj post manĝo-klaĉo

Lors du dernier repas-tchatche de l'association à Belcastel, la quinzaine de participants a pu observé le ciel tarnais de ce 1er juillet grâce au télescope et aux explications en espéranto de Marc.

Unua objekto estis Saturno, kiu troviĝis tiam en Virgo. Ĝi montris siajn ringojn kaj striojn.

Dua objekto. Post tiu bela planedo, mi celis teleskope ĉe la konstelacio de Herkulo, pli precize ĉe M13 kiu estas globa stelamaso farita el pli ol pluraj centmiloj da steloj. Tial ĝi nomigxas M13. Malkovrita de Edmond Halley en 1714, Charles Messier aldonis ĝin en sia katalogo en 1764. Ĝi do portas la M de Messier en sia nomo.



Tria objekto. Sekve, ni iris ĉe Liro en kiu troviĝas Vego, kiu estis nia norda stelo antaŭ kelkaj miloj da jaroj. En tiu konstelacio mi celis M57 kiu estas eksstelo. Ni vidas nun nur la gason, laŭ ringa formo, kiu eskapis el tiu stelo kiam ĝi mortis.

Kvara objekto – M8 situas ĉe sagitario, sude kaj proksime de la horizonto, lime de Lakta Vojo. Fakte estas du objektoj. Unu estas nebulozo kaj la alia estas malfermita amaso. Sed ĝia malalteco super la horizonto necesigas bonan ĉielon.

Kvina objekto – M17. Nebulozo laŭ “artikeca” formo. Ĉiam en la sama konstelacio. Eble ni devus fumi por plibonigi la vidon.

Sesa objekto M27. Planeda nebulozo kiel M57. Ĝi estas eksstelo kiu mortis forigante gason videblan laŭ formo de ronĝita pomo. Ĝi lokiĝas ĉe konstelacio de Vulpino.

Lasta objekto, M51 lokita ĉe konstelacio Ĉashundoj. Du galaksioj, unu manĝanta la alian. sed por vidi tion, oni bezonas bonan ĉielon kaj praktiki malrektan vidadon. Tiel ni ne plu uzas la konusojn de la okulo sed ĝiajn bastonetojn, kiuj pli sentivas. Eble alian fojon ni pli parolos pri tio.

Marc

Pollando : Sur la paŝoj de Zamenhof

Kvinope ni emocie klinis sur la tombon de Zamenhof en la juda tombejo de Varsovio en Pollando.

Historio spruĉas ĉie en tiu lando, kaj la spuroj de militoj aperas ne nur en muzeoj, sed en la stratoj de la urbo.

Sed, kiom da ĝojo legi inter la linioj de la busoj: ESPERANTO, ĉe angulo de strato: ul. Zamenhof, en alia, esperanto strato.... Ĉiuj varsoviaj almenaŭ aŭdis pri la lingvo, eĉ kelnerino kiu bedaŭras ke ŝi neniam lernis ĝin....

Fakte la plejparton de la zamenhofaj spuroj, ni malkovris en Bjalistoko, naskiĝurbo de nia heroo.

Kune kun Pŝemek, ni vagadis tra la kvartaloj kie juna Zamenhof ludis, lernis, studis, kreis, kaj ankaŭ suferis. Ĉie en la urbo vizitanto povas sekvi la allogajn priskribojn pri la vivo de la kreinto de la lingvo. Statuoj, skulptaĵoj, desegnaĵoj, verkoj videblas tra bela promenado en Bjalistoko.



Post interesinda vizito de prezentado de la urbo dum la epoko de Zamenhof, afabla Ela varme akceptis nin en la esperanta biblioteko, kie, trinkante teon, ni aŭskultis pri la esperanta etoso de la tiea kulturcentro kaj pli....

Kion diri pri la renkonto en « esperanto kafo » kie ĉiuj parolantemuloj kuniĝas ĉirkaŭ tabloj kie ŝildo anoncas la lingvon. Ni mire konstatis ke en Bialistoko, vi povas elekti paroli ĉu en la esperanta, hispana, angla, itala, rusa, portugala, franca lingvo. Kompreneble la esperantan rondon ni elektis, vigle babilante, trinkante dolĉan tipan trinkaĵon.

Alveninte en Toruno, urbo de fama Koperniko, varma akcepto de Teresa kaj Irena plenigis niajn korojn: promenado en bela, vivplena urbo, mirinde prezentita de niaj ĉiĉeroninoj... esperantlingve, kompreneble.

Ĉu vi pensis ke mi forgesis la kialon de nia emo vojaĝi al Pollando?



La plej bonan, mi elektis flankgardi por la fino: revidi niajn karegajn geamikojn, Agnieszka, Krzysztof kaj ilajn tri filinojn, Zelia, Nastia kaj Miuka.

Ni tiom bele kunvivis en esperanta etoso en Francio, ke ni vere ŝuldis tiun viziton al ili!

Jes, mi povas konfesi ke la esperanta familio tra la mondo proponas neatenditajn rilatojn, kaj sincere ligas la homojn trans la limoj de la lingvoj.

Evelyne

L'Agenda du Kroko'

Retrouvez l'agenda mis à jour sur notre site : www.esperanto.toulouse.free.fr.
Sauf indication contraire, pour toute demande de renseignement concernant l'agenda, merci de prendre contact avec Christine (Kiki) au 06.31.68.00.26 ou 05.61.62.39.48, ou bien en écrivant à esperanto.toulouse@free.fr

SEPTEMBRE - SETTEMBRO 2011

Mardi 13 et 27 sept. : Conversation en espéranto

Horaire : 19h30

Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses (à côté de la Poste de Compans-Cafarelli).

Objectif : pratiquer la langue dans une bonne ambiance.

Organisateur : Asso Bilingue

Lundi 19 sept. : Apéro d'ouverture de la Bibliothèque + Libroservo

Horaire : à 18h

Lieu : Maison de quartier Rangueil, 19 rue Claude Forbin, 31400 (Métro Rangueil, ou bus 34).

Nous offrirons l'apéritif et installerons le libroservo pour vous faire découvrir quelques nouveautés.

Plus d'infos : contactez Marion : 06 87 64 75 84

Jeudi 15 sept. : Assemblée générale annuelle d'EKC

Horaire : à 19h00

Lieu : ENSEEIHT : 2, rue Camichel (Métro François Verdier)

Mercredi 21 sept. : Apprendre l'espéranto avec le Centre Culturel Espéranto de Toulouse

Présentation publique sur les cours d'espéranto proposés par le Centre Culturel Espéranto de Toulouse

Horaire : De 20h à 21h

Lieu : Maison de quartier Rangueil, 19 rue Claude Forbin, 31400 (Métro Rangueil, ou bus 34)

Jeudi 29 sept. : Soirée film

"La horoj" film en anglais sous-titré en espéranto.

Horaire: de 20h à 22h et à partir de 19h30 pour manger un morceau.

Lieu : Le bâton à palabres, 15 rue de Thionville

Tarif : 2 euros, une boisson sans alcool offerte

Contactez: Marion : 06 87 64 75 84

OCTOBRE – OKTOBRO 2011

Samedi 01 octobre : Journée des Associations Place du Capitole - Stand

Horaire : 10 h. - 18 h

Objectif : informer sur la langue internationale espéranto et notre association

Pour aider, contactez Marion (06 87 64 75 84)

Mercredi 05 oct. :

Début du nouveau cours pour débutants à l'ENSEEIHT

Horaire : 19 à 20h30

Objectif : être capable de se débrouiller dans la majorité des situations de la vie courante, en voyage ou en congrès (niveau B1 du CECRL).

Contactez Christophe (06 31 80 40 07)

Reprise du cours annuel de conversation à la Maison de Quartier de Rangueil

Horaire : 20h à 21h30

Renseignements et inscriptions: Rikardo : 05 61 25 55 77

Vendredi 07 oct. : Repas-Tchatche / Manĝo-klaĉo

Lieu : Maison de Quartier de Rangueil, 19, rue Claude Forbin (Metro Rangueil)

Horaire: à partir de 20h00

Sam /dim 08 et 09 oct. : Week-end Découverte (et pratique) de l'espéranto

Horaire : du sam. 10 h. au dimanche 17 h.

Lieu : Gîte La Maraude, 09800 ARROUT.

Objectifs : Niveau débutant : Découverte de la langue espéranto et de sa culture + 2 niveaux de conversation

Contactez: Christophe : 06 31 80 40 07 ou 05 61 99 68 28

Mardi 11 et 25 oct. : Conversation en espéranto

Horaire : 19h30

Lieu : au café Le Cactus, 13, boulevard Lascrosses (à côté de la Poste de Compans-Cafarelli).

Vendredi 14 oct.: La place des étudiants - Stand

Lieu: place du capitole

Horaire: de 17h à 20h

Un Forum associatif pour informer les nouveaux étudiants de la richesse associative et culturelle toulousaine.

Pour aider, contactez Marion (06 87 64 75 84)

Lundi 17 oct. : Conférence sur l'espéranto

Lieu: AVF de Saint-Orens, place de la Poste

Horaire: de 17h à 18h30

Renseignements : Liliane, 05 61 002 176

28 au 31 oct. : 35° Congrès catalan à Barcelone

Kataluna Kongreso de Esperanto (Barcelono, Katalunio)

Covoiturage à partir de Toulouse possible